

Rekorda KIES en Jerusalemo



Foto: la aŭtoro

Meze de decembro okazis jam la oka tradicia dutaga Komuna Israela Esperanto-Semajnfino (KIES), ĉi-foje en Jerusalemo. Partoprenis rekorda nombro de pli ol 60 personoj, el ili ses eksterlandanoj el tri landoj (Nederlando, Danio kaj Japanio).

Inter la gastoj troviĝis la nederlandaj aktivuloj Ans kaj Hans Bakker, kaj Takaŝi Ago, direktoro de Esperanto-Populariga Asocio (EPA) de Oomoto. Dank' al la eksterlandaj gastoj regis en la kunveno internacia etoso, nekutima en Israelaj kunvenoj.

Okazis ekskursoj en la orienta Jerusalemo, kie la partoprenantoj vizitis la Okcidentan Muron kaj Sciencan Muzeon apud la Jerusalema Universitato. Nokte oni povis sperti ĉiel-observadon per teleskopo, koincide kun la meteora pluvo de la Ĝemenidoj. Ankaŭ la endoma programo estis rekorde varia kaj abunda: kulturaj, muzikaj kaj klerigaj programeroj. Pluraj el ili estis dediĉitaj al Oomoto kaj Japanio. Interalie okazis la prelegoj *Roterdamo: urbo de la UK en 2008* (la prezidantino de ties LKK), *Muzika historio de la grupo Akordo* (ties membro Arjen-Sjoerd de Vries) kaj *Afrika Agado* (Hans Bakker).

La renkontiĝon organizis kaj gvidis Nava Cinori (administrado) kaj Amri Wandel (programo). Rondo de Esperanto-Vojaĝantoj en Israelo (REVI)

ekskursis kun kelkaj eksterlandaj gastoj al la Morta Maro kaj la Oazo Ein Gedi, kie KIES okazis pasintjare. La grupo vizitis la apudan riveron Arugot, kio estis planita pasintjare, sed ne efektiviĝis pro inundo (vidu RE decembro 2006). Post sia partopreno en KIES, Takaŝi Ago prelegis ankaŭ en la Tel-Aviva klubo kaj en la Haifa Norda grupo, kie li vizitis

Bahaan centron. Li renkontis plurajn israelajn gravulojn, kiel vicurbestro de Jerusalemo Yigal Amedi, parlamentano Beni Eylon, direktoro de la ministerio pri eksteraj aferoj kaj la urbestro de Modiin. La aŭdiencoj okazis en Esperanto kun tradukado al la hebrea. La gravuloj interesiĝis pri Esperanto kaj proponis helpon al la projektoj de Oomoto, por progresigi la pacon en la Mezoriento. Aparte interesa estis privata renkontiĝo kun Prof. Werblowski, mondfama specialisto pri orientaj religioj.

Amri Wandel

Kultura festivalo en Ĉeĥio

La tradicia 19-a Internacia Kultura Festivalo okazis de la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 2007 en la ĉeĥa urbo Ústí nad Labem.

La vendreda programo apartenis al interkona vespero de la ĉeestantoj, venintaj el diversaj lokoj de Bohemio, Moravio kaj Germanio. La ĉefa tago de la festivalo estis la sekva sabato.

En la trihora prelega matineo oni aŭskultis sep prelegojn akompanatajn de vigla diskuto. Inter aliaj programeroj de la matineo menciindas la ĉeesto de la ĉeĥa poetino Marie Dolistová,

kies poemoj estis prezentitaj paralele kun Esperanta traduko. Ŝi emociplene esprimis sian miron pri la surprize alta tradukeblo de la poemoj en Esperanton, pri la belsoneco de Esperanto kaj la tute libera parolfluo de la ĉeestantoj dum la diskutoj.

Sabate posttagmeze okazis spirita koncerto en la preĝejo de Sankta Paŭlo, kiu enhavis klasikaĵojn de mondaj komponistoj prezentatajn en Esperanto